

🎉🎉 *Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj LEKanoj!* 🎉🎉

### Grava anonco pri la Novjara Festo!

Por ke oni pli bone preparu la feston, bonvolu informi Anica Page (anica\_page@btinternet.com) antaŭ la 8a de januaro se vi esperas veni. La konsilantaro invitas al membroj donaci surloke iom da mono, por tiel partpagi la iom altajn kostojn de trinkaĵoj ktp.

### Kluba Programo:

#### januaro:

- 2 Neniu kunveno
- 9 Novjara Festo
- 16 Diskuto: *Kion signifas "patriotismo"?*
- 23 *Lingva Studrondo* – gvidata de Terry Page (1800h: konsilantaro)
- 30 Ludoj (gvidataj de Ana Montesinos)

#### februaro:

- 6 Socia Vespero
- 13 John Wells: Lingva Seminario (1800h: konsilantaro)
- 20 Ludvespero
- 27 Olga Kerziouk: Socia Retuzo rilate al Brita Biblioteko

#### marto:

- 6 Socia Vespero
- 27 Jarkunsido

### Esperanta Kalendaro:

17-19 aprilo: 96a Brita Kongreso, *Jubilee Library* Brighton: <http://britakongreso.org>  
25 julio-1 aŭgusto: 100a Universala Kongreso de Esperanto, Lillo, Francio: <http://uea.org/kongresoj>

### Aliaj anoncoj:

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a februaro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

**Kun bedaŭro**, ni havas la malgajan informon ke nia longdaŭra klubano Hussein Al-Amily mortis la 28an de decembro, en malsanulejo de Ealing, kun aĝo de 87 jaroj.



Hussein Al-Amily, n. 1927; m. 28 dec 2014

### Vigla vespero ne nur Zamenhofa

La 12an de decembro - alivorte je la ĉi-jara vendredo plej proksima al naskiĝ-datreveno de D-ro Zamenhof - klubanoj festis, kiel kutime, liajn vivon kaj verkaron. Tamen ne *tute* kiel kutime, ĉar oni samokaze omaĝis al alia koloso de la Esperanto-movado, Profesoro Ivo Lapenna.

Kial, do? Ja ne mankas motivoj por honori Lapenna-n, kiun oni nomis "arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA", nek por tion fari en kunveno de klubo, kiun li iam frekventis kiel membro. Sed kial omaĝi ĝuste nun, en decembro 2014?

Tial, ĉar ĝus okazis sesdeka datreveno de decido de Unesko akcepti en konsultan rilaton lian "modernan UEA", kaj ĉar tiu historie grava sukceso plenumiĝis nur dank' al zorga preparado kaj konvinka oratorado, ambaŭ fare de Ivo Lapenna. Pri tio rakontis al klubanoj Prof. John Wells, kiu mem dumlonge kaj persone konis la honoraton.

Poste li direktis nian atenton al pli frua oratoraĵo, nome al la festparolado de D-ro Zamenhof, okaze de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905. Voĉlegante laŭvice la tekston de tiu parolado, klubanoj sin memorigis pri la emocie esprimitaj esperoj de la fondinto de nia movado, kaj rerenkontis memorindajn dirojn liajn. Same kiel tiuj kongresanoj en Bulonjo-sur-Marco, ni LEK-anoj alvenis el landoj diversaj; kaj same kiel ili ni tamen sentas nin, dank' al Esperanto, neniel reciproke fremdaj "sed homoj kun homoj".

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere ĉe Londona Irlanda Centro. Antaŭ la ĉefprogramero kaj dum la paŭzo klubanoj kutime amasiĝas en la komforta enirhalo por kaftrinki kaj babili.

Kutima programo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero

22:00 fino



Loko: London Irish Centre,  
50-52 Camden Square, NW1 9XB

(tel: 020-7916 7272)

Metrostacio: Camden Town

Fervojo *London Overground*: Camden Road

Busoj: 29, 253, 274, 31.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo  
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,  
Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,  
11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB  
01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidantoj: Valerie Atkinson, Husejn Al-Amily;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Matt Peperell, Olga Kerziouk, Antony Rawlinson (Program-sekretario kaj Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: Esperanto, c/o London Irish Centre (adreso supre) lek.sekretario@gmail.com;

Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap\_esp-lek21@yahoo.co.uk,

Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry\_page@btinternet.com, anica\_page@btinternet.com,

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

En 28a de decembro mortis Honora Vic-Prezidanto, S-ro **HUSEJN AL-AMILY**. Ni ĉiuj havas karajn memorojn pri lia neforgesebla karaktero – pri liaj ĉefeste deklamitaj poemoj, personaj anekdotoj, dividitaj fotoj, originalaj artikoloj, elkoranaj aforismoj, amo al la aŭtoro G B Shaw, sennombraj akompanintoj al LEK-kunvenoj, arabaj vestaĵoj, invitoj kunmanĝi, 'Kara'-alparolaĵoj, energiaj kuraĝigoj al junuloj kaj senĉesa varbado por Esperanto. Mi jam sentas la mankon, kaj ni honoru lin dum la Novjara Festo.

Parolante pri 2015, la nova jaro certe donos allogajn programerojn. La ĉiea kaj ĉiama uzado de sociaj medioj (ekz. *Twitter*) estas afero egale interesa kaj taŭga por Esperantistoj, kiel por ne-Esperantistoj. La pli junaj generacioj de samideanoj komunikas per tiaj elektronikaj metodoj kvazaŭ per la propraj lipoj. Ni do bonvenigas baldaŭan prezenton de **OLGA KERZJUK**, pri la uzo de sociaj medioj fare de la Brita Biblioteko. Ni ankaŭ ne forgesu, ke Prof. **JOHN WELLS**, Vic-Prezidanto de LEK, ofte instigas membrojn aliĝi al *Facebook*, por resti en ĝisdata kontakto kun lokaj kaj foraj esperantistaroj. Tial, ni lernu, antaŭdanke al Olga, kiel ŝia organizo reklamas kaj ĝenerale informas ktp per la plej modernaj – kaj ofte la plej facile atingeblaj – iloj je ĉies dispono. Ĉar, kiel Prof. Wells ankaŭ memorigis nin, "La brita Movado antaŭ eĉ cent jaroj konscie metis sin ĉe la pinto de la teknologio, por atingi siajn celojn".

... Nu, kiel sekvi tion? Tiel, ke ni saltu en novan jaron kun komuna memfido. Tiel Husejn rekomendus, ĉu ne?

Sincere,

*David Thornell*

